

Kotizproponoj por 2012

La Estraro proponas al la Komitato la sekvon (ĉiuj sumoj en eŭroj):

ILEI-membreco kun papera revuo A-lande: 18 → 20 (+11%)

ILEI-membreco kun papera revuo B-lande: 9 → 10 (+11%)

ILEI-membreco kun reta revuo A-lande: 8 → 10 (+25%)

ILEI-membreco kun reta revuo B-lande: 4 → 5 (+25%)

Abono Juna amiko A-lande: 14 → 16 (+14%)

Abono Juna amiko B-lande: 9 → 11 (+22%)

Abono Juna amiko kvantrabate A-lande: 11 → 13 (+18%)

Abono Juna amiko kvantrabate B-lande: 7 → 9 (+28%)

Membriĝo kaj abonoj por 2012 aŭ 2013 estos akceptitaj laŭ nunaj tarifoj ĝis la 31a de decembro 2011.

Motivigo de la altigoj:

- Jam tri jarojn ni havas deficitajn rezultojn kaj nun havas neniun alternativon ol krei buĝetojn kun deficitoj, kio prefere ne ripetiĝu eterne, eĉ se la kapitalo daure bone fartas.
- La tarifoj restas samaj de post almenaŭ 2005, eble pli longe.
- La kostoj tra tiu epoko signife altiĝadis.
- La pezo de afranko aparte kruele altiĝis (por Juna amiko +22% en 2010)
- La agado de ILEI dramece intensiĝis, kaj bezonas honorariatajn helpantojn, aldone al la libervolaj kontribuoj de estraranoj, aliaj aktivuloj kaj la sekcioj.
- Akcepto de la alitgo permesas al la komitato esprimi sian aprobon al la nunaj reformoj kaj antaŭeniĝoj en la liga agado.

La pli signifa altigo por reta membreco havas kelkajn motivojn:

- la organiza kosto prizorgi la retajn membrojn estas tre peza, multe pli ol por paperaj membroj. La postsekvado de paneintaj retadreso postulas multajn horojn da tempo, ne plu uzebla por pli utilaj taskoj.
- la signife kreskanta populareco de tiu membroformo permesas al ni konservi nian membro-nombron, precipe en B-landoj, sed negative influas la enspezojn.
- la ekonomieco de presado de fizika revuo fariĝas ĉiam pli malbona, ju pli la konsumata kvanto falas sub mil ekzempleroj.
- la granda plimulto de la retaj membroj ne estas novuloj, kiel esperite, sed iamaj paperaj membroj, kiuj ŝanĝis kategorion.

La pli signifa altigo de la B-landaj tarifoj por Juna amiko havas motivojn:

- multaj landoj en la B-landa grupo tamen spertas signifajn kreskojn en pagipovo.
- la superrega kosto por la revuo estas afranko, kio samas por A- kaj B-landoj, ĝis la punkto, ke B-landa livero apenaŭ plu portas netan enspezon.
- jam de jaroj la revuo havas deficiton, kiun ILEI ne povas eterne pravigi. (preskaŭ mil eŭroj en 2010)

Iam ILEI devos rekonsideri siajn kategoriigojn de landoj: la trinivela modelo kiun aplikas UEA (ekzemple ĉe la KER-ekzamenoj) donas modelon inda je studo.